

Ora Ĵurnalo

Numero 29, Majo 2020



Iam la stacidomo de la fervojo "Bergslagsbanan" Göteborg – Kil.

Al la tuta mondo:

Bonvenon al la **verda Gotenburgo!**

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Blankdorsa buntpego/Vitryggig hackspett ..	13
Pri Ora Ĵurnalo	2	Jen la kranio de norrlanda kulo	14
Espeporko meditas.....	3	Nia "esperanto-biblioteko" en Stannum, 23 km de Gotenburgo	14
Upprop till alla esperantister i Sverige	4	"Biblioteko" de Ŝtefo Urban	15
Iĝu TEJO-volontulo	4	"La arto labori kune" – festlibro por Humphrey Tonkin	16
Letero al la redaktoroj	5	El la maja numero de "Lingvo Internacia" en 1896	17
Proverbo de Monica.....	5	Sen Paraŝuto de Poul Thorsen.....	17
Estrarkunveno en la iama bazlernejo de Gunnilse 10 majo.....	5	Sageoj kaj rakontoj laŭlonge la Rejno	18
La Eŭropa-tago estis celebrita per digitalaj paroloj	6	"La knabo, kiu vivis kun strutoj" de Monica Zak.....	19
Koncerto en covid-19-tempoj	6	"Esperanto eniras en mian vivon" – el Memorlibro pri Gaby Tréanton	19
Mafalda zorgas pri la tero.....	7	Daniel kaj Edith faras vojaĝon sur plezurkroza ŝipo	23
El Pollando Elvira sendis ĉi tiujn bildojn pri la situacio pro la pandemio	8	Someraj hajkoj	25
Esperanta kverko – el letero de Elvira Twardowska.....	8	La revo pri Ameriko	26
Antaŭ la 400-jara jubileo de Gotenburgo.....	9	Usona rakonto de Kerstin Rohdin	27
Esperantoplatsen – La Esperanto-placo en Gotenburgo	10	Ralf Jalming pri sia unua vizito en Moskvo ..	30
Axel Svensson kaj la Komerca ĝardeno Hildedal, Tuve, Gotenburgo	11	Strangaj kreskaĵoj	32
Jan Hellström, denaske fervora birdamatoro.....	12		

Pri Ora Ĵurnalo


Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat,
073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina
paĝaranĝo: Andreas Nordström,
arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espeporko meditas



- ☆ Kion oni povas fari kiam la covid-19-viruso devigas nin ĉesi pri la kutimaj aktivecoj?
En Gotenburgo ni laboras pri nia esperantobiblioteko, konstruas novajn bretarojn (Lasse) kaj alfabetajn bloketojn (Siv) por pli facile trovi la deziratan libron.
- ☆ Al la biblioteko ni ricevis de Aino belan memorlibron pri Humphrey Tonkin. Ĝi ampleksas 900 paĝojn. Alia memorlibro estas "Rakontoj pri mia vivo". Temas pri Gaby Tréanton el Bretonio, kiu forpasis la pasintan jaron. Ŝi havis gotenburĝan leteramikinon, Annelie Mononen, kiu estas menciita en la libro.
- ☆ Ĉu vi konas Tryckfels-Nisse/Druckfehler-Teufel/Preserara Koboldeto? En "Sageoj kaj Rakontoj laŭlonge la Rejno" vi povas legi kiel tiu fenomeno ekis.
- ☆ Vojaĝi oni ne faru ĉi tiun jaron! Sed memoroj pri mirindaj iamaj vojaĝoj abundas.
Daniel David, Francio, skribas pri

krozado: Francio – Skotio – Ŝetlanda insularo – Feroaj insuloj – Norvegio kaj reen al Francio.

Ingegerd skribas pri la malnova revo pri Ameriko de malriĉaj svedoj kaj Kerstin Rohdin skribas pri vizito en Nord-okcidenta Usono, kie indiĝenaj popoloj troviĝas.

Ralf Jalming skribas pri sia unua vizito en Moskvo.

- ☆ Mi vere cerbumas ĉu iu legas nian Ora Ĵurnalo de la komenco ĝis la fino. Mi koncedas ke estas multaj paĝoj. Monica certe legis multon en la pasinta numero, ĉar ŝi ŝatas legi pri bestoj. Ŝi skribis leteron al ni pri tiu temo. Ĉiam estas agrable ricevi leterojn de nia legantaro!
- ☆ Pri kio vi volus legi en la venonta numero, kiu ampleksos du monatojn – junion kaj julion. Ĉu vi havas ideon? Ĉiam vi povas trovi la antaŭajn numerojn per www.esperanto-gbg.org.

Distancon brakumon!

Espeporko / Siv

Upprop till alla esperantister i Sverige:

översätt

”ESPERANTORESAN TILL LITAUEN 9 APRIL – 3 MAJ 2005”!



I Göteborgsklubben har vi haft en översättarcirkel som översatt ”Stilettkappen” till stora delar. Det skulle vara roligt om denna bok blev färdigöversatt! Folke Wedlin har sagt att han fortsatt vill hålla i det hela.

Vi tänker att vi börjar med en uppvärmning!

En händelse som vi gärna vill delge övriga esperantovärlden är **Folkes resa till Litauen med sina esperantoelever från Lerums gymnasium.**

Ett riktigt härligt minne!

Bli vi några, som enligt Folkes recept, översätter en bit var till esperanto, är det snart gjort. Om många anmäler intresse går det ju väldigt fort, och då har vi ju andan uppe för att fortsätta med ”Stilettkappen”, enligt uppgift Sveriges första kriminalroman.

Anmäl till ingegerd.granat@telia.com

Folke Wedlin leder båda och resetexten finns i **Ora Ĵurnalo nr 10, 2018** (länk finns på www.esperanto-gbg.org). Inte skall vi låta resten av Esperantovärlden missa denna underbara historia? / *Ingegerd*



JUNE KAJ KUNE

Îgu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2020–2021)

En ĉi tiu ligilo vi trovos informon pri la kondiĉoj kaj eblecoj esti volontulo en **tejo**, UEA dum unu jaro.

Via aĝo: inter 18 kaj 30 jaroj.

<https://www.tejo.org/esc2020/>

Sendu vian kandidatiĝon ĝis la **31-a de majo 2020**.

Letero al la redaktoroj

Mi opinias ke estas interese legi la gazeton Ora Ĵurnalo, ĉiun monaton.

Speciale dum la aprila monato! La ĵurnalo tiam temis pri bestoj.

Mi aŭskultis radioprogramon antaŭ kelkaj jaroj. Temis pri libroj kaj skribado, mi ne memoras plu.

En la programo oni diris ke bestrakontoj bone vendiĝas. Daŭrigu skribi interesajn artikolojn pri ĉio ajn inter ĉielo kaj tero.

Monica.



Proverbo de Monica

Svede: **Man lär sig ett språk genom att omfamna det.**

Esperante: **Oni lernas lingvon per brakumi ĝin.**

Koran dankon, Monica! Ĉiam valoras havi kontakton kun niaj legantoj.

Siv

Estrarkunveno en la iama bazlernejo de Gunnilse 10 majo




Sep personoj el la estraroj de Esperanto-Societo de Gotenburgo kaj la senprofita fonduso de la tekslaboristo E.S. Nilsson sidis je granda distanco unu de la alia en klasĉambro en la malnova bazlernejo de Gunnilse kaj faris saĝajn decidojn.

Sur la supra bildo: maldekstre la nova prezidanto Ingegerd Granat, dekstre la vicprezidanto Siv Burell – ambaŭ el la Esperanto-Societo de Gotenburgo.

Lasse Granat fotis.

Spanska sjukan för nästan exakt 100 år sedan, (1918-1920) ...låter det bekant?



La Eŭropa-tago estis celebrita per digitalaj paroloj



EU, la corona-krizo kaj kio okazos estonte?

Kiel la krizo influas la membrandojn de EU? Kiel ni povas kunlabori? Ĉar la Eŭropotago ĉi tiun jaron okazis sabate (9 majo) la debato estis vendrede la 8an de majo.

Estis vico de programeroj, sed la debato inter tri komisiitoj komencis la tagon – en la bildo demaldekstre: Hans Dahlgren, EU-ministro, moderigas la interparolon de Margot Wallström, EU-komisiito 1999–2010, Cecilia Malmström, EU-komisiito 2010–2019, kaj Ylva Johansson, la nuna EU-komisiito.


En Twitter Anna-Maria Corazza, membro de la Eŭropa parlamento 2009–2019, skribas (svede):

”En la Eŭropa Tago troviĝas multo por celebri – venko sur diktaturoj, jarcentoj da paco, libereco, bonfarto.

Tamen, pli da solidareco kaj kunlaboro necesas en la nuna covid-19-krizo” (libere tradukita de mi).

Mi demandas min: kial ne estis pli da atento pri tiu tago en la televido kaj en la gazetoj (GP)? Oni diris ke estas 75 jaroj da paco... sed celebradon mi ne vidis. /Siv

Koncerto en covid-19-tempoj



Jen la Finnlandia Himno, kantata de centoj da kantistoj rete:

https://www.youtube.com/watch?v=kG1WcTLDJ1E&fbclid=IwAR0hog_8NVnO_l0hZADtmftMGfWlbzmeD6p_oIGNloxjnpF5DxwPppWFOO

”Tack för att vi i dessa undantagstider får leva i ett fritt Finland!”

”Dankon pro tio ke ni en ĉi tiuj rezervejaj tempoj povas vivi en libera Finnlando!”

El Facebook /Siv

Mafalda zorgas pri la tero

Fransoazo Oazo enmetis pecon de mia tre ŝatata bildserio Mafalda en sian Facebook-paĝon. Malgraŭ ke Mafalda estas eta knabino, ŝi tamen kutimas mediti pri la sanstato de la mondo.

Mafalda estas la ĉefrolulo de argentina humurserio de la desegnisto Quino, kreita en 1962.

Mafalda estas ses-jara knabino, kiu meditas pri politiko, la statoj de la mondo kaj la

universo. Ŝia plej granda revo estas ke la nacioj de la mondo kontraktiĝu pri paco, kaj ke ĉiuj maljustecoj foriĝu. Ŝia dombesto estas testudo, al kiu ŝi donis la nomon Burokrato. La serio estis ĉesigita en 1973. Dum la 80a jardeko ĝi tamen aperis en svedaj gazetoj de la eldonejo Nordan.

El Facebook /Siv



El Pollando Elvira sendis ĉi tiujn bildojn pri la situacio pro la pandemio

IDZIE ZARAZA?

ĈU LA PESTO VENOS?

Jak koronavirus dezorganizuje nasze bzytle

Kiel koronaviruso ĝi malorganizigas en sonĝo

(Tio estas la traduko kion faris Google Translate).

Elvira skribas: Tiel aspektas nun via amikino Elvira, forirante al vendejo por aĉeti bulkojn. La masketo kaj la gantoj estas devigaj.

Mi ne brakumas vin, nur salutas de malproksime.

/Elvira



Mia komentario: Tamen la koronaviruso – malgraŭ la seriozeco – okazas humurajn bildojn. /Siv



Esperanta kverko –

el letero de Elvira Twardowska, Pollando

Ŝi skribas:

Venis belaj printempaj tagoj. Feliĉe jam eblas iri arbaren, do ni vizitis nian Kverkon.

Estas bela ideo rakonti en la Ora Ĵurnalo pri niaj geamikoj – bestoj (en numero 28).

Mi sincere salutas Vin
/Elvira

Sur la bildo: Elvira kaj Marek. Lucina fotis.

Ingegerd kaj Lasse Granat raportas ke nia gotenburga esperanto-kverko bone kreskas en Gunnilse, Gotenburgo.



Antaŭ la 400-jara jubileo de Gotenburgo/ Inför Göteborgs 400-årsjubileum



Eftersom de planerade seminarierna under 2020 inte kan genomföras p.g.a. smittrisken, sker planeringen i stället via ett "jubileumsmagasin 2020":

https://www.goteborg2021.com/uploads/2020/04/Jubileumsplan_2020_lowres_uppslag.pdf

Bland "Jubileumssatsningar" återfinns följande:

GÖTEBORGS ESPERANTO-FÖRENING

Göteborg är en mångspråkig stad. Vi önskar sprida information om Esperantos möjligheter att vara brospråk mellan olika nationella språk.

Esperanto har globala ambitioner. Det finns talare i ca 120 olika länder och med adressboken "Pasporta Servo" kan man hitta esperantister i ett 70-tal länder som erbjuder övernattnings och guidning av sin stad.

Till jubileumsåret 2021 kommer vi att arrangera historiska vandringar, sommarkurser och ge ut fyra tvåspråkiga nättidningar med tema "Göteborgs historia" och vad esperanto har betytt för staden.

LA ESPERANTO-SOCIETO DE GOTENBURGO

Gotenburgo estas multlingva urbo. Ni deziras disdoni informon pri la eblecoj de Esperanto esti pontlingvo inter diversaj naciaj lingvoj.

Esperanto havas globajn ambiciojn. Troviĝas parolantoj en ĉirkaŭ 120 diversaj landoj kaj per la adresaro "Pasporta Servo" eblas trovi esperantistojn en sepdeko da landoj, kiuj ofertas tranoktojn kaj gvidadon pri sia urbo.

Por la jubilea jaro 2021 ni aranĝos historiajn rondirojn, somerajn kursojn kaj intencas eldoni kvar dulingvajn retgazetojn kun la temo. "La historio de Gotenburgo" en kiu ni rakontos, kion esperanto signifis por la urbo.

Rimarku ke nuntempe la adresaro Pasporta Servo nur troviĝas en reta versio!

Staden har fem mål:

FEM MÅL FÖR ATT GÖRA ETT INTERNATIONELLT AVTRYCK

- genom att arbeta för att Göteborg blir en stad där invånarna trivs, känner delaktighet, stolthet och framtidstro.
- BLI EN MODIG FÖREBILD FÖR HÅLLBAR TILLVÄXT genom att uppfylla och överträffa redan beslutade mål.
- VIDAREUTVECKLA GÖTEBORG och den omgivande regionen genom bred samverkan med stadens nämnder och bolag samt lokala, regionala, nationella och internationella aktörer.
- ENGAGERA HELA STADEN i firandet genom att bjuda in till fortsatt öppen dialog där alla kan delta.
- STÄRKA BILDEN AV GÖTEBORG genom effektiv kommunikation och marknadsföring.

/Siv

Esperantoplatsen – La Esperanto-placo en Gotenburgo



La placo ricevis sian nomon en 1954 – per iniciato de la Esperantaj kluboj (tiam estis pluraj) en Gotenburgo. Sur la placo ABF (la kleriga asocio de la laboristoj) kaj la Esperanto-Societo jam de longe aktivadis. En 2004 la Lingvo-kafejo malfermiĝis en Esperantoplatsen. La dungitoj regis plurajn lingvojn kaj oni instigis diskutojn en multaj lingvoj. Nun la lingvoj havas diversajn tagojn:

Lunde: hispana, rusa, germana, pola

Marde: nederlanda, sveda, itala, franca

Merkrede: japana, angla, ĉina, portugala

Ĵaŭde: hispana, katalana, franca, sveda

Ĉiam estas iu lingvo-kunordiganto, kiu prenas la flagon de la celita lingvo, metas ĝin sur tablon, kaj post la 17a h homoj venas kaj sidiĝas ĉe la dezirataj tabloj.

La sola kondiĉo estas ke oni aĉetas manĝaĵon aŭ kafon kun kukoj por almenaŭ 45 SEK. Facile oni atingas tiun sumon, ĉar ĉio estas sufiĉe multekosta, sed aliflanke oni ja povas sidi tie babilante dum kelkaj horoj. La lokalo estas alloga kun libroj, fotoj k.t.p.

Vi certe demandas al vi: – Kial Esperanto ne troviĝas en la programtabelo. Jes kial? Ni estis tie de tempo al tempo, sed por regulaj renkontiĝoj ĉiun semajnon ni ne pretas. Krome, dum ĉi tiu korona-tempo pli decas

sidi hejme, legante nian Ora Ĵurnalo aŭ skribante artikolojn por ĝi. Granda parto de la E-klubanoj ja havas pli ol 70 jarojn kaj

apartenas al la t.n. riskgrupo kaj ne devas ricevi la kovid-19-malsanon.

Siv

Axel Svensson kaj la Komerca ĝardeno Hildedal, Tuve, Gotenburgo



Mia praavino Inga (kies nomon mi heredis) havis fratinon. La edzo de la fratino estis Wilhelm.

Kiam naskiĝis Hilda Maria la patrino mortis, sekve Inga fariĝis la dua edzino de Wilhelm kaj la familia nomo estis Dahlin.

Wilhelm kaj Inga havis 9 infanojn pli, do unu filino estis mia avino kaj la fama sportisto Martin Dahlin estas unu el la pranepoj.

Hilda Maria trovis sian edzon Axel Svensson en Gotenburgo en la jaro 1902.

Axel Svensson naskiĝis en suda Svedio, Kristianstad en 1876. Dum sia vivo li loĝis dum 5 jaroj en Anglio, lernis pri orkideoj kaj komerca ĝardeno laboro.

En la jaro 1919 li konstruis la domegon Hildedal en Tuve, Hisingen. La nomo estis honore al la edzino Hilda Dahlin.

En la granda loko ĉirkaŭe, apud kaj fronte estis la komerca ĝardeno kun plantdomoj.

Tie kreskis la tomatoj kaj la kukumoj, amase. Tial Axel Svensson havis la kromnomon "Kukum-Svensson".

Hilda kaj Axel vendis siajn produktojn en la bazaro kaj vendoplaco sur la Reĝa placo de Gotenburgo.

En 1943 Axel mortis kaj lia sola filo Axel Y. Svensson transprenis la domegon kaj la plantdomojn kaj li laboris ĝis 1984.

Mi kaj mia familio dum la jaroj 1950–1984 ofte vizitis Hildedal, estis trajna veturo inter Falköping kaj Gotenburgo.

La domo estis por ni infanoj bela kastelo kaj la plantdomoj estis tre imponaj. Estis granda festo viziti Hildedal.



*Inga Johansson
(fotis: Ingegerd)*

Jan Hellström, denaske fervora birdamatoro



De tempo al tempo Jan skribas en Ora Ĵurnalo pri birdoj – en ĉi tiu numero pri blankdorsa buntpego. La revuo "Fåglar på Västkusten" (Birdoj en la Okcidenta Marbordo) havas en la lasta numero tri paĝojn pri Jan sub la rubriko "Denaske birdamatoro – volonta birdobservisto en Fridhem (Gotenburgo) kaj – en Yellowstone (Usono)".

El la artikolo mi lernas ke:

- La intereso por birdoj startis kiam Jan, tiam du-jara, portis kokinon en la kuirejon (certe ne por manĝi ĝin).
- Inter 1977 kaj 2000 li faris 19 eksterlandajn vojaĝojn, ofte kune kun sia patro.
- Li treege ŝatas la nacian naturprotektejon de Yellowstone kaj ofte revenas tien. Foje li proksimiĝis al laĝeto kie staris alko. Io timigis la alkon, kiu forkuregis. Aperis urso!!! Jan forŝteliĝis por resti nerimarkita, ĉar la ursoj en Yellowstone povas esti danĝeraj.
- Ankaŭ en Kenjo li escepte de birdoj ankaŭ vidis multajn sovaĝajn bestojn,

kiam ili venis al akvejo. Antaŭ la vojaĝo al Kenjo, Jan provis lerni la svahilan – sed trovis ke **Esperanto estas multe pli facila lingvo**. Li partoprenis la Esperanto-Sabatojn en Gotenburgo por aŭskulti prelegojn kaj paroli esperanton, sed nun ili kompreneble paŭzas.

- Multaj el la membroj de GOF, (Gotenburga Ornitologia Asocio) havas "birdmanĝigejojn" kie ili regule metas semojn por ke birdoj transvivu la malvarman sezonon. Jan havas sian.

Okazas ke Jan gvidas birdpromenojn – ne maltrafu partopreni (kaj membriĝi en GOF), se vi havas eblecon!

/Siv

Blankdorsa buntpego – Vitryggig hackspett



Jan Hellström informas:

La blankdorsa buntpego estas la plej granda el la buntpegoj. Nuntempe ĝi tre maloftas.

Printempe estas bona tempo iri en la naturo, aŭskultante tamburantajn pegojn. Eblas distingi la diversajn pegojn pro la tamburaj ruladoj.

La 19an de aprilo en 2006 mi alvenis al Bräcke Ängar, bona naturrezervejo en norda Dalslando. Post kelkaj horoj mi ekvidis la blankdorsan pegon, kiam ĝi tamburis. Sukcesis fari la digiscoping-bildon tra lorno. Nuntempe tiu speco ne plu troviĝas en Dalslando. /Jan

Jan Hellström, Margareta Andersson kaj mi ekskursis 14 majo en Hisingsparken, parko en la norda parto de Gotenburgo, kaj povis vidi i.a. blanknigran muŝkaptulon (svartvit flugsnappare, *Ficedula hypoleuca*), jen kaptita per mia simpla komputilo.

/Andreas

Vitryggig hackspett är den största av brokspettarna. Den är numera mycket sällsynt.

Våren är en bra tid att gå ut i naturen och lyssna på trummade hackspettar. Det går att skilja de olika hackspettarterna på trumvirvlarna.

Den 19/4 2006 kom jag med buss till Bräcke Ängar, ett fint naturreservat i norra Dalsland. Efter flera timmar blev jag varse den vitryggiga hackspetten, när den trummade. Lyckades ta digiscoping-bilden genom en tubkikare. Numera finns inte denna art kvar i Dalsland. /Jan



Här är kraniet på en norrländsk mygga



Jen la kranio de norrlanda kulo

Anna-Lena de Örnsköldsvik sendis la jenan bildon al Facebook. Ŝi dum ĉi tiu semajno ekvidis la unuan kulon. Frue, ĉu ne? Oni diras ke la naturo en Norrlando estas grandioza, do ankaŭ la kuloj!

Tamen, kuloj certe ne disvastigas la covid-19 viruson, aŭ... ??!! /Siv

Nia "esperanto-biblioteko" en Stannum, 23 km de Gotenburgo



La registrado de centoj da libroj postulas tempon. Excel ja estas bona ilo por tiu laboro. Mi tre longe prokrastis la registradon de la dua sendaĵo de la libroj de Ebbe Vilborg, fare de lia filo Niclas. Multaj preferas serĉi laŭ la titoloj. Ili ankaŭ ne ŝatis longan vicon da libroj komencantaj pri "La". Do, mi registris ekz. "La

Faraono" sub la litero "F". Poste mi ne povis uzi la aŭtomatan literlistigon. Tiam la "La-libroj" ja metus sin en vico.

Kelkfoje mankis la jaro de la eldono, kelkfoje estis neklare ĉu la libro estis skribita origine en esperanto aŭ estis tradukita. Vera defio!


Tamen mi lernis multon. Ofte mi paŭzis la registradon por legi partojn de libroj. Mi miras pri la abundo de poemoj kaj la

**"Biblioteko" de Ŝtefo Urban,
poemo, trovita en libro pri bestoj:**

De la libroj
longa vico
moke ridas
kun malico

Laŭ la tuta
kilometro
ne legita
eĉ ĉapitro!

Rigardata
kun la indo
estas sole
leda bindo



En la Antaŭparolo de Ezopo, skribita rekte en esperanto, Poul Thorsen skribas: "En pli vasta perspektivo, la internacia lingvo ne imponas per laŭroj pruntitaj de naciaj literaturoj. Esperanto estos respektata kiel vivanta lingvo nur per originala verkado."

ampleksaj romanoj, klasikaj kaj modernaj.
Mankas al ili legantoj.

Birdo kaj aeroplano de Ŝtefo Urban

Kantaĵo

Flugis birdo
en spiralo
de la monto
al la valo;
ku-ku-ku-ku!


Ĝin renkontis
la helico (=propeller)
tre moderna –
lasta vico;
ku-ku-ku-ku!

– Via flugo
kara ido,
tre malfruas
je rapido;
ku-ku-ku-ku!

La kukolo
klakis bleke
kaj respondis
iom seke:
ku-ku-ku-ku!

– Birdoj flugas
kun la kanto.
Aeroplano?
Diletanto!
ku-ku-ku-ku!

Feliĉe ni havas Sten Johansson, Leif Nordenstorm, Kalle Kniivilä, Folke Wedlin kaj... ????? kiuj rekte skribas esperante pri diversaj temoj. Prizorgu ke ili havu legantojn! Se vi havas pliajn ekzemplojn, bv skribu pri ri en Ora Ĵurnalo! /Siv



”La arto labori kune” –

festlibro por Humphrey Tonkin farita de UEA
okaze de lia 70a datreveno

Redaktis ĝin: Detlev Blanke kaj Ulrich Lins.

Aino Åberg donacis al nia esperanto-biblioteko en Stannum ĉi tiun libron, kiu enhavas 900 paĝojn. Multaj famaj esperantistoj kunlaboris. Ni povas vidi Tonkin en diversaj roloj, situacioj kaj landoj. /Siv

Mi citas: Okaze de la 70-a datreveno de Humphrey Tonkin, UEA eldonas tiun festlibron. Ĝi enhavas kontribuojn de centoj da homoj diversmaniere ligitaj al la jubileulo.

Humphrey Tonkin akiris rekonon en sia fako kaj ankaŭ impone agis kiel prezidanto de sia universitato. La festlibro elstarigas tamen lian meriton kiel unu el la plej influhavaj agantoj de la Esperanto-komunumo dum la lastaj jardekoj. La aŭtoroj estas homoj, kiuj akompanis lin kiel kolegoj kaj kunagantoj aŭ dividis kun li la interesigon pri difinita fako. Ili kune donu la ideon pri la amplekso de la laboro de Tonkin. Kelkaj memoroj ĵetas, parte anekdotforme, iom da lumo sur la homon Humphrey Tonkin. La aŭtoroj kaj la du redaktoroj deziras per tiu ĉi volumo esprimi dankon al Humphrey Tonkin pro ĉio, kion li donis al nia lingvo, movado kaj komunumo.

Stefan MacGill skribas sub la rubrikon: **Ĉiama Esperanto-parolanto:** Mi ekkonis Humphrey Tonkin baldaŭ post mia ekdeĵoro en la Centra Oficejo en 1976 kiel la dua partoprenanto en la volontula programo. Dum pluraj jaroj kiel prezidanto de UEA li regule venis al Roterdamo, kaj ni evidente ĉiam interparolis

en Esperanto. Kvinon da jaroj poste, li estis uzanta la telefonon en mia ĉambro, dum mi ordigis dokumentojn. Por atingi iun, mi aŭdis lin konvinke elbuŝigi kelkajn frazojn en la itala. Poste en alia voko, li subite ekparolis angle, kaj tuj fariĝis, en mia percepto, alia homo. Subite frapis min, ke en pli ol kvin jaroj mi neniam aŭdis lin eĉ unufoje paroli angle. Mi preskaŭ devis ĉesigi al mi pensi: ”Huu, kiom flue li regas la lingvon!” kaj ”Fakte ni havas duan egalecon komunan lingvon.” Des pli interese mi subaŭskultis, ĉar lia elparolo temis pri iu maldifinebla, mezatlantika hibrido – nek pure brita, kaj certe ne pure usona.

Ŝajnas ke subkonscie ni ligas homojn kaj iliajn personecojn kun difinitaj lingvoj. Subtene al tiu teorio, kiam ajn mi alparolas miajn du pli aĝajn filinojn angle (eĉ dum vizito al Britio), ili rigore respondas en Esperanto (aŭ escepte hungare) sed neniam angle, kvankam mi scias tute bone (denove subaŭskultado), ke ili nun bone regas ĝin. Simile, Humphrey por mi ĝis tiu momento – kaj ĉiam poste – estas homo difinita per tio, ke li estas rigora kaj ĉiama Esperanto-parolanto.

El la maja numero de "Lingvo Internacia" en 1896



Vojaĝoj de esperantistoj.

– S-ro V Langlet jam komencis sian vojaĝon tra Rusujo. El Uppsala li forveturis en Petersburgon. Ĉirkaŭ la 25an de majo li estos en Moskvo kaj poste venos en Niĵni-Novgorod. El la ekspozicio li veturos al Borisoglebsk kaj vizitos tie s-ron Kazi-Girej kaj poste venos en Varsovion, kie lin renkontos s-ro Wazniewski, bona kaj malnova amiko de Esperanto.

Progreso de nia lingvo.

Kiel scias jam niaj legantoj, nia lingvo havis en la lastaj monatoj grandajn sukcesojn en Francujo, Portugalujo kaj Svedujo. Juĝante laŭ kelkaj leteroj, ricevitaj de ni en la lasta tempo, ni povas diri, ke la lingvo tre bone progresas, ankaŭ en Rusujo. La nombro de la membroj de la societo Espero en Peterburg konstante pligrandiĝas kaj oni komunikas al ni, ke en Odeso kredeble baldaŭ oficiale permesita fondi la filion de tiu ĉi societo. En Melitopol (gub. Tavriĉeskaja) fondiĝas rondeto de esperantistoj; tie laboras s-ro T. Ŝĉavinski.

Sen Paraŝuto de Poul Thorsen

El la biblioteko de Stannum

(el Postpluke):

1. Pri la dana elparolo:


Prononco aŭ kol-kataro:
Laŭdire la Inferon
neniam la danoj envenas.
Ilian gorĝan kveron
eĉ ne la Diablo komprenas.

2. Malĝuste

La libroj estas bona societo,
kaj tamen kelkaj plendas,
ke ili ĉiam desur sia breto
la dorsojn nur prezentas.

3. Logike

Li malfruas ĉiumatene
en la laborejo sen plue,
sed kompensas ĉiam revene
foirante tiom pli frue.



Paul Thorsen (1915–2006) estis dano. Li verkis kun aliaj multajn librojn. Mi aparte ŝatas lian kunlaboron kun Piet Hein (Kumbel Kumbel) pri Gruk 1956 – spritaj diraĵoj en poezia formo. Estis artikolo pri Piet Hein en Ora Ĵurnalo n-o 8 en 2018 paĝoj 15–16. /Siv

Sageoj kaj rakontoj laŭlonge la Rejno

de Johanna Pafenstecher

El la biblioteko en Stannum

Gutenberg kaj la diablo.

Unu nokton Gutenberg, la eltrovinto de la presarto, ankoraŭ tre malfrue laboris en sia metiejo en Majenco. Ĝus li estis laboranta por komposti la literojn de nova teksto, kiam la Diablo, kiu ja ĉiam estas tre scivola, ŝteleniris la ĉambron, vestita kiel vojaĝanta lernanto.

“Nu, ankoraŭ ĉe la laboro, majstro?” li demandis, “kian strangan metion vi faras?”

“Estas ankoraŭ sekreto”, flustre respondis Gutenberg, ja ekkoninte la Malbonulon, “sed mi volas rakonti al vi. En ĉi tiuj malgrandaj plumbopecetoj estas kaŝita granda sorĉo; per ili mi povas fari sorĉlibrojn, tiel dikajn kaj terurajn kiel mi volas, kaj disvastigi ilin en la tuta mondo.”



“Ho! estas bona afero!” pensas la Diablo, “tion mi ne povas lasi forgliti de mi”, kaj laŭte li diris: “Volonte mi helpas al vi.”


“Bone, vi povas turni la turnilon de la presmaŝino.”

La Malbonulo ne igis diri tion al si dufoje. Entuziasme li turnis la turnilon tiel forte, ke li komencis ŝviti, formetis siajn vestaĵojn, kaj same entuziasme turnis sian voston.

Kiam Gutenberg komencis detiri la unuan folion, la Diablo ne povis sufiĉe rapide ekvidi la teruran sorĉon, sed – kvazaŭ tarantule pikita li returnsaltis kaj malbenante kaj malbonodore li fuĝis tra la pordo! Ĉar sur la unua folio staris en belaj literoj jena teksto: **Novum Testamentum**.

De tiam la Malbonulo estis la ĉiama malamiko de la nova arto. Centojn da diabletoj li alvokis kontraŭ ĝi. Kelkaj el ili inspiris la verkintojn presigi vere diablajn verkojn, kiuj malbonigis la homojn, kaj aliaj devis malordigi la literojn. Ĉi tiuj estas nomitaj **Druckfehler-Teufel** (preserardiabloj), kaj ankoraŭ hodiaŭ ili ofte ĉagrenas la aŭtorojn. /Siv

”La knabo, kiu vivis kun strutoj” de Monica Zak



Laŭ letero, kiun ricevis Inga Johansson, ni scias ke la origine svede skribita libro per esperanto trovis sian vojon al Aŭstralio.

Jen la letero:

Kara Inga,

Kun plezuro mi povas anonci al vi ke mi finprovlegis la libron, kiun Carl-Orf Selenius tradukis.

Se ne estus pro koronaviruso mi ne povus tion fari!

Mi esperas ke la libro povos esti reviziita kaj ke mi povos ĝin legi kun miaj studentoj.


Dankon al vi por konatigi tion al mi.

*Amikajn salutojn,
Franciska*

Komento: Pardonu Carl-Olof Selenius, ke Franciska erare literumis vian nomon. Mi antaŭvidas artikolon de vi pri vi mem por la somera numero de Ora Ĵurnalo. /Siv

”Esperanto eniras en mian vivon”

El Memorlibro pri Gaby Tréanton. Francio. Pri ŝia gotenburga leteramikino, Annelie Mononen, oni ankaŭ povas legi.



Gaby: – lun tagon en la sindikata ĵurnalo de la instruistoj, ”La Liberiga Lernejo” (*l'École Libératrice*), mi legis anoncon: ”Lernu Esperanton! Skribu al sinjoro Micard”. Ĉu Esperanto? Paĉjo jam parolis pri tio al mi. Dum la Hispana milito en 1936. Mi ne forgesis! Mi skribis al sinjoro *Micard* (al tiu sinjoro ni ŝuldas la Greziljono-Kastelon pri kiu ni reparolos poste). Sinjoro *Micard* rilatigis min kun mia Esperanto-instruisto per poŝtkorespondado, *Jeannine Perra*. Ŝi loĝis en *Lyon* kaj sendis al mi mian unuan taskon. Mi faris ĝin, ricevis la duan, kaj tiel plu... Esperanto estis ludo tiel amuza kiel vortkrucenigmoj. Mi ŝatis la latinan lingvon, kiam mi estis en mezlernejo en *Morlaix*. Sammaniere Esperanto plaĉis al mi, sed mi ne demandis min ankoraŭ, kion mi faros danke al ĝi poste. Puŝita per intuicio eble, intuicio kiu gvidis mian tutan vivon, mi

daŭrigis mian ludolernadon. Dum la paŭzoj prigardante miajn dekdu lernantinojn mi reviziis kelkajn vortojn skribitajn sur papereto, kiun mi tiris el mia poŝo. Iun tagon kun la ekzercoj de Esperanto mi ricevis el *Lyon* paperon: "SCI (*Service Civil International*) internacia civila servo. Alvoko al bonvolaj gejunuloj". Temis pri laborkampo de junaj volontuloj el diversaj landoj, kiuj konstruos sportan terenon en *Châteaudun* (departemento *Eure-et-Loire*) dum somero. Mi enskribiĝis puŝita de mia inklino por novaĵo, por malkovro.



Karl Ullström kun kvar svedinoj.

Kiam somero alvenis mi trajnveturis ĝis *Châteaudun*. Je la enirejo de la kampadejo mi rimarkis panelon: PACO. Temis do pri pacista organizaĵo. Ĝis nun, mi ne klarvidis tion. Mi ĉefe vidis la socialan celon, la interhelpon. Mi tute konsentis kun la vorto PACO, kaj mi aliĝis. La Civila Servo estis kreita de svizo *Pierre Cérésolle*, kiu volis servi sian landon, sed ne per armiloj. En la kampadejo estis precipe eŭropanoj (angloj, germanoj, skandinavo) kaj usonanoj. Ni interparolis en la angla lingvo aŭ la franca. Mi estis lerninta la anglan en lernejo, sed mi ne bone ĝin parolis.

Kelkajn tagojn post mia alveno oni anoncis al ni kvin svedojn. Du parolis france, du angle, la

kvina parolis nur svede kaj esperante. La organizantoj de la kampadejo ekkriis: "Ha! *Gaby!* Vi diris al ni ke vi lernas Esperanton! Iru atendi ilin al la stacidomo". Niaj svedoj alvenis. *Karl Ullström* la esperantisto estis ĝojega renkonti iun kiu komprenis lin. Li entuziasme ekparolis al mi. Mi haltigis lin dirante: "Malrapidu!". Do li malrapidis, kaj mi ĉion komprenis. Ĉu ne estis mirinde por mi kompreni svedon post trimonata studo de Esperanto per koresponda kurso, kiam mi neniam provis paroli la lingvon antaŭe? Mi plibone komprenis Esperanton post tri monatoj ol la anglan lingvon post sep studjaroj! Tiu sperto instigis min daŭrigi.

Anneli

Dum somero de la jaro 2002 mi akceptis hejme Nikol-n *Rizzoni* akompanatan de sia pariza amikino, *Michèle*, kaj de ties sveda korespondantino, *Anneli*. Alvenante Nikol anoncis sian rapidan viziton: nur saluteton, pro ekskurso planita ĉe la rozgranita marbordo. Mi proponis, ke ili sidiĝu.

"Ni ne havas tempon", respondis Nikol, kiu tamen deziris montri al la amikinoj mian

sovaĝan ĝardenon en kurbiĝo de rivereto *Kerduel*.

Dum ilia promenado en la ĝardeno, rapide mi preparis teon. Revenante Nikol ekkriis: "Ŝi falis en la riveron kaj ne plu povis elakviĝi!"

– Kiu? mi demandis.

– *Olympe*, mia hundino! Nun mi sekigu ŝin. Ĉu vi povas doni al mi malnovajn tukojn?

– Kompreneble, jes.

Nikol aldonis: "Anneli ne parolas la francan. Parolu al ŝi en la angla". Iom serĉante miajn vortojn, mi diris al Anneli: "In which town of Sveden are you living?". Anneli respondis: "In Göteborg".


Mi: "Estas la urbo de la venonta Universala Esperanto-Kongreso. Se nun vi eklernas Esperanton, vi povos partopreni en la U.K. Esperanto estas multe pli facila ol la franca aŭ la angla...". Anneli aŭskultis, ŝajnis pripensi, sed ne pridemandis.

Ĉar Nikol devis sekigi sian hundinon antaŭ ol eniri la aŭton, mi havis dek minutojn por paroli al la du amikinoj. Poste ili foriris kun la hundino duone sekigita.

Je Kristnasko mi ricevis la bondezirojn de Anneli esperantlingve, kun nur kelkaj anglaj vortoj je la fino de la letero: "Mi studas Esperanton, but it is the beginning...". Feliĉa, mi gratulis ŝin. Aliaj leteroj de Anneli alvenis, pli kaj pli longaj. Nun Anneli estas la plej akurata korespondantino, kiu skribas tuj post ricevo de miaj leteroj. Mi same faras. Nun ŝi atendas min en Göteborg. Tial mi decidis partopreni en la U.K. (en 2003).

"Rakontoj pri mia vivo"

Gaby Tréanton (1920–2019) estis elstara homo de norda Bretonio (okcidenta regiono de Francio). Post infanaĝo en Morlaix, ŝi iĝis instruistino por bazlernejoj, en departementoj Finistero kaj Côtes d'Armor, interalie sur la insulo Bréhat. Ŝi finis sian profesperiodon en Saint-Quay-Perros, kaj tie emeritiĝis. Tiu malforta virineto impresis ĉiujn, kiuj renkontis ŝian vojon. Ridetema, diskreta, humila, sed nelacigebla kaj nekredible decidema, ŝi investis sin en pluraj asocioj, homhelpaj, filozofaj, pacistaj, kaj ĉefe agadis por Esperanto, kiu estis la vertebrata komuno de ĉiuj ŝiaj engaĝiĝoj. Dank' al la internacia lingvo, Gaby multe vojaĝadis, kaj havis multajn korespondantojn kaj amikojn en la tuta mondo. Unu el ŝiaj esperanto-



Gaby en sovaĝa naturo.

lernantoj, Maja, havis la ideon, laŭlonge de la jaroj, rakontigi al ŝi ŝiajn memorojn. Tiu kolekto de memoraĵoj, dulingva, estas historio de plena vivo dediĉita al homaro, plena je anekdotoj mirindaj kaj spritaj. Ni konsilas la legadon al ĉiu kiu konis Gaby-n, sed ne nur, ĉar tra tiu libro, oni multe malkovras pri diversaj aferoj: vivmaniero en Bretonio antaŭ la dua mondmilito, la vivo dum milito, la vivo de juna instruistino en kamparaj vilaĝoj, informoj pri asocioj kaj movadoj ne ĉiuj tute konataj. Vi legos anekdotojn kelkfoje mirindajn kaj emociigajn. Ekzemple Gaby rakontas: kiam ŝi estis infaneto, la horloĝisto de la kvartalo sonorigis ĉiujn horloĝojn de la butikoj samtempe por plezurigi ŝin. Kiam infano ŝi estis terurita pro infero, dezirante morti tuj post sia komunio

por ne havi tempon peki kaj do eniri paradizon. Kiam dufoje ŝi savis infanon el dronado. Kiam ŝi decidis bicikli el Saint-Brieuc al Parizo por vidi Parizon liberan tuj post la fino de la milito. Kiam ŝi preskaŭ mortis pro paŝo sur elektraj trajnreloj. Ŝi rakontas pri sia

amaso da korespondantoj el la tuta mondo, pri sia partopreno al multaj kongresoj aŭ aranĝoj; ne nur esperantaj. Multaj fotoj ilustras la libron, de la infaneco ĝis la lastaj naskiĝfestoj.



Esperantokurso en Francio. Annelie kun sunbriloj sidas en la mezo.



Gaby kaj Annelie...



kaj la kato de Gaby.



Gaby skribis sur la "katkarto": "Mia kato Julo el la ŝtuparo rigardas malsupren la hundinon de Nicole. Ĝi timas malsupreniri kvankam la hundino neniam minacas katojn."

Annelie kaj Nicole ĉe ŝtonkavo.

Komento: La du unuaj bildoj estas el la memorlibro, la aliaj el la albumo de Annelie. /Siv

Daniel kaj Edith faras vojaĝon sur plezurkroza ŝipo



Jen mapo de ilia itinero...

Vojaĝi

Mi ĉiam revis vojaĝi.

Kiam mi estis sepjara knabo, nia instruisto disdonis mondmapojn. Mi miriĝis antaŭ tiuj mapoj. Mi montris Aŭstralion al mia amikoj kaj diris: «Kiam mi estos granda, mi iros tien....»

Mia patro estis fervojisto ĉe la nacia kompanio de francaj fervojoj. Pro tio, ni povis vojaĝi per trajno senpage tra la tuta Francio. Mi do vojaĝis kaj malkovris mian landon pli ol miaj amikoj.

Kiam mi estis plenkreskulo, mi vojaĝis en Eŭropo, ofte pro Esperanto. Mi partoprenis renkontiĝojn aŭ vizitis geamikojn en diversaj landoj: Svislando, Hungario, Jugoslavio, Hispanio, Rumanio, Svedio...

Kaj kiam mi emeritiĝis, mi havis sufiĉe da tempo, kaj sufiĉe da mono, por fari plurajn grandajn vojaĝojn, pri kiuj mi revis, de kiam mi estis infano.

Mi neniam vizitis Aŭstralion!

Sed mi vidis mirindajn lokojn kiel Marakeŝo, Samarkando, San-Francisko, Pekino, Kaburbo,



kaj foto de Daniel kaj la ŝipo.

Jerusalemo, Kebeko, Monument Valley, la Viktoria akvofalo de la rivero Zambezo...

En ĉi tiu aprilo 2020, en Francio, pro tiu terura viruso, ni rajtas nur promeni unu horon ĉiutage kaj ne pli ol unu kilometron de nia domo.

Do, mi povas nur memori ĉi tiujn belajn vojaĝojn.

La plej memorindaj vojaĝoj ne estas ĉiam la plej malproksimaj, tiuj, kie oni vidis grandiozajn lokojn.

Ekzemple, nekutimajn memoraĵojn mi havas de mia ŝipondiĝo sur la Norda maro.

Edith, mia edzino, kaj mi iom timis trapasi pli ol unu semajnon sur tiaj grandaj ŝipoj.

Sed tiu vojaĝo komenciĝis en Dunkirko, kie ni loĝis tiam, kaj la ŝipo *Costa Voyager* estis la malpli granda de tiu fama itala kompanio: la pasaĝeroj estos nur ĉirkaŭ okcent.

Ni estis en junio. La vetero estis bela.

Forirante de la haveno, ni vidis el la ŝipo la apartamenton, kie ni loĝis tiutempe. Sed rapide aperis la nebulo.

La unua halto estis en *Bergen* en Norvegio. La marveturo inter Francio kaj Norvegio daŭris pli ol tagon.



Bergen.

Ni do konatiĝis kun la aliaj pasaĝeroj. Mi estis tiam 62-jara, sed probable unu el la plej junaj pasaĝeroj.

Dum la ŝipirado, la ŝipanaro pretigis konferencojn, ludojn, spektaklojn. Kantistino, kiu antaŭ longe gajnis *Eurovision*-konkurson vojaĝis kun ni.

Kiam ni alvenis en *Bergen*, pluvis. Mi aĉetis pluvombrelon ĉar mi forgesis la mian en la taksio en Dunkirko.


Mi diris al la vendistino: «Via urbo estas bela. Mi jam vizitis ĝin antaŭ dekkvin jaroj.» Ŝi respondis: «Tiam jam pluvis!»

Certe la urbo havas pluvan klimaton, sed ni faris interesan ekskurson per pli malgranda ŝipo en la ĉirkaŭaĵo. Ni ankaŭ vizitis *Bryggen*, la mezepokan kvartalon da lignaj domoj kaj la fiŝbazon, kie oni vendas eĉ karnon de baleno.

La dua halto estis *Flåm*. Kia bela vidaĵo kiam la ŝipo progresas malrapide en la Aurlandsfjordon! Dum antaŭa vojaĝo, mi povis admiri kelkajn fjordojn de altaj lokoj. Ankaŭ el la ŝipo la spektaklo de la naturo estas mirinda.

El *Flåm*, ni faris ekskurson per malnova trajno kaj vidis imponajn akvofalojn.


Ni forlasis Norvegon, kie pluvas kelkfoje, sed kiu havas belegajn pejzaĝojn.



Aurlandsfjordo.

La tria halto estis *Tórshavn*, en la Ferooj. Tie ne plu estas precize la Norda maro.

Dum la vespermanĝo, ni babilis. Ni estis mirkonsternitaj: niaj kunmanĝantoj ne sciis, ke la Ferooj estas dana teritorio. Homoj partoprenas vojaĝon, ne sciante en kiuj landoj ili haltos!



Feroaj insuloj.

Mi tre ŝatis tiun insularon. Preskaŭ neniu arbo, dolĉaj verdaj pejzaĝoj, sovaĝaj rokaj marbordo, agrablaj vilaĝetoj...

Sur la ŝipo, ni partoprenis ludojn, aŭskultis koncertojn kaj prelegojn, sed ni ŝatis ankaŭ resti ekstere, varme vestitaj, sidante sur la supra ferdeko: neniu lando, neniu alia ŝipo, nur la maro kaj birdoj... Ni ĉiam estis solaj ekstere, la aliaj pasaĝeroj preferis resti en la salonoj.

Ni alvenis al *Lerwick* en Ŝetlandoj. Denove, kvietaj pejzaĝoj, sed ni vidis pli da bestoj: interesaj maraj birdoj kaj fokoj. Ni faris ekskurson al impona arkeologia loko *Jarlshof*, kie oni povas vidi *broch*. Estas konstruaĵo el sekaj ŝtonoj de la Ferepoko.

Ni haltis poste en *Invergordon*, urbeto apud *Inverness*, en Skotlando. Tiu malgranda havenurbo estas interesa pro la muraj



La muro de Hadriano.

pentraĵoj sur multnombraj domoj. Per aŭtobuso, ni veturis ĝis la lago *Loch Ness*. Ni vizitis la belan mezepokan kastelon de *Urquhart* sur la lagobordo, sed ni ne vidis la faman monstron.



Invergordon, apud Inverness, Skotlando.

Lasta halto: *Newcastle-upon-Tyne* en Anglio.

Tie, pluvis pli forte kaj pli longe ol en Norvegio! Ni tamen faris ekskurson por vidi la Muron de Hadriano, kiu defendis la nordajn limojn de la Romia Imperio. Instrua sed tre malseka ekskurso.

Ni rehejmiĝis, kontentaj pri ĉi tiuj travivaĵoj, pri ĉi tiuj nekutimaj turismaj cellokoj.

Estis nia unua vojaĝo sur granda ŝipo, sed ankaŭ la lasta. Ni estas tro aktivaj por tiaj vojaĝoj.

/ Daniel David

Someraj hajkoj



En la somerdomo
mi komforte kuŝas surdorse
kaj vojaĝas kun la nuboj *Yaha*

Sola virino
rigardas el la fenestro
pluvas, pluvas *Kikaku*

Fulgoro* eklumis *) eldfloga
ĉu vi vidis, mi volis diri
sed mi estis sola *Taigi*

La birdo
malaperas
direkte al la insulo *Bashō*



La revo pri Ameriko

Svedio estis mizerigita lando kun loĝantaro de tri milionoj dum la mezo de la 19a jarcento. Milito, malsato, malbona rikolto kaj malriĉeco ruinigis homojn, kiuj vivis en la kamparo. La mortado de infanetoj estis granda kaj la deprimado kreskis ĉie en la lando.

El la mizero de la homoj kreskis la espero pri alia vivo. Multaj familioj vendis siajn hejmojn kaj vojaĝis okcidenten al Ameriko. Kelkaj estis aventuristoj aliaj estis ekloĝantoj. Kelkaj atingis siajn celojn, aliaj ne.

1,3 milionoj da homoj, kiuj kapablis, forlasis Svedion antaŭ la jaro 1920.

Neniu tiom bone priskribis la grandan vojaĝon kiel Vilhelm Moberg en sia granda epopeo kiu nomiĝas "La elmigrintoj", "La enmigrintoj", "La koloniintoj" kaj "La lasta letero al Svedio".

Sed kie ajn la vojaĝo startis en la lando, ĉiuj devis vojaĝi al Gotenburgo kaj al "Emigranternas hus" en "Packhusplatsen" por vojaĝi al Ameriko.

La esperoj pri la nova lando ili kunportis al la agentaj kontoroj kiuj aranĝis biletojn kaj la listojn pri pasaĝeroj.

Drömmen om Amerika

Sverige var ett utarmat land med en befolkning på cirka 3 miljoner invånare i mitten av 1800-talet. Krig, svält, missväxt och fattigdom härjade med de boende på landsbygden. Barnadödligheten var hög och missmodet växte på många håll i landet.

Ur människornas armod växte hoppet om ett annat liv. Många släkter och familjer sålde sina hemman och ställde sin färd mot väster, mot Amerika.

Somliga var lycksökare, andra var bosättare. Några nådde sitt mål, andra inte.

1.3 miljoner av dem som orkade med att resa hade lämnat Sverige vid år 1920.

Ingen har så väl beskrivit denna stora resa som Vilhelm Moberg i sitt stora epos, "Utvandrarna", "Invandrarna", "Nybyggarna" och "Sista brevet till Sverige".

Men var man än startade sin resa i landet fick man ta sig till Göteborg och till "Emigranternas hus" på Packhusplatsen för att ta sig till Amerika.

Förhoppningarna om det nya landet följde med till agentkontoren. Biljetter och passagerarlistor ombesörjdes.

Estis miksita grupo kiu iris sur la strato "Sillgatan" (nuntempe Postgatan) kaj pensis malantaŭen kaj antaŭen. Ili estis maltrankvilaj kaj sentis angoron. Ili sopiris hejmen antaŭ ol ili forvojaĝis.

Jes, ĉio tio eĥas en la Gotenburga memoro de tiu tempo se oni iras sur la historiaj stratoj hodiaŭ.

Devas esti granda decido por iu aŭ iuj, kiuj volus vojaĝi. Daŭra adiaŭo por ĉiam. Multe da elmigrintoj fakte ne volis vojaĝi sed nepre devis akompani la familion. Kristina el Smolando neniam volis vojaĝi. Ŝi rigardis post si antaŭ ol ŝi foriris kaj kiam ŝi estis olda ŝi sidis sur pendilo en la astrakana arbo en la nova lando kaj sopiris hejmen.

Ŝia vivo estis pli bona ol la vivo en Smolando sed ŝi havis sian radikojn en Smolando.

/ Ingegerd

Det var en blandad skara som gick på Sillgatan (numera benämnd Postgatan) och tänkte bakåt och framåt. Blev oroliga och ångestfyllda, längtade hem innan de hunnit bort.

Ja, vad allt ekar inte i Göteborgs minne från den tiden om man går på Postgatan idag.

Det måste ha varit ett stort beslut för den eller de som skulle resa. Ett utdraget farväl och för alltid. Många utvandrare kanske inte ens ville resa, men var tvungna att fara med familjen. Kristina från Småland ville aldrig åka. Hon såg sig om innan hon reste och när hon blev äldre satt hon i gungan i astrakanträdet i det nya landet och längtade hem.

Hennes liv blev bevisligen bättre men hon hade sina rötter i Småland.

/ Ingegerd

Usona rakonto de Kerstin Rohdin

Vizito en Nordokcidenta Usono

Denove mia filino Ingegärd, donis al mi la grandan ĝojon viziti ŝin kaj ŝian familion en fora Usono dum tri semajnoj. Tio estas granda ĝojo por mi, ĉar ni vidas nin reciproke tre malofte. Kiel vi certe komprenas nia komuna tempo estis plena de babilado pri aferoj kiuj okazis de lastfoje, admiroj pri novaj kreaĵoj en la domo.

Dum la juna generacio laboradas, avino kun sia filino ĝuis matenmanĝon apud la fajro en la nova fajrejo en la biblioteko. Ni havis nekredeble multe preparoli kaj ni feliĉis ke niaj voĉoj ne strikis. Mi akompanis Ingegärd en ĉio kion ŝi faris. Ĉiun tagon ni "promenadigis" du hundojn, unu nigran elegantan, parte labrador, alia pli malgrandan aspektantan kiel vulpo. Ni promenis inter la kvartaloj kaj rigardis diversspecajn vilaojn kaj ĝardenojn. Inter la kvartaloj restis pecoj de la antaŭa arbarego. Grandegaj cedroj, abioj, valoj, montetoj.



Ankaŭ en la ĝardenoj oni lasis resti grandajn arbojn. Iun tagon ni aŭtis al Downtown Bellevue por rigardi kiel multe oni dum la lastaj jaroj konstruis altajn nubskrapilojn. La urbo multe kreskis, ĉar tiu urbo Bellevue ja estas la "hejmloko" de Microsoft. La hejmo de Bill Gates, la kreanto de Microsoft, situas ĉe Lake Washington, kiu situas inter Bellevue kaj la grandurbo Seattle. Elegantaj, vitraj domoj sin streĉas al la ĉielo en la centro de Bellevue, sur lokoj kie antaŭe situis vilaoj kaj malgrandurbaj stratoj.

Niklas, la edzo de Ingegärd, kiu laboras ĉe Microsoft loĝas je promenada distanco de sia laboro. Bonŝance en granda urbo! Ni festis Thanksgiving hejme en ilia domo. Ingegärd, kiu tre ŝatas bele ordigi en kaj ekster la domo aranĝis etosoplenan bufedon kaj manĝotablon. La mebloj devenas de la hejmo de miaj gepatroj, poste ili staris en mia hejmo kaj nun ĉe Ingegärd en Usono.

Ni manĝis meleagron kompreneble. Ili iam vivis sovaĝaj en Ameriko. En kelkaj lokoj ili ankoraŭ tion faras. Dum la multaj horoj, kiujn la meleagro pasigas en la forno ĝi estas plenigita de "stuffing" (ŝtopaĵo). Kutime estas tre grasa enhavo, sed Ingegärd enmetis sovaĝan rizon kaj plurajn fruktojn. Pli saniga kaj bongusta! Ignamo, burĝonbrasiko, kaj konfitaĵo de oksikoko ankaŭ nepras sur la telero. La deserto estas pajo kun limeto aŭ nuksoj.

Ni plej solene festis la grandan usonan feston Thanksgiving. Miaj "infanoj" bone lernis kiel konduti en sia nova lando! Ili nun dum dudek jaroj loĝis en Okcidenta Usono, nuntempe en la regiono nomita Nordokcidento (Northwest). La ŝtato estas la lasta el la ŝtatoj en Usono eble krom Alaska. La granda teritorio Oregon estis dividita 1898 en la nuna Oregon kaj la plej norda parto fariĝis Washington State. La okcidenta parto de Usono havas pli da vasteco, oni vidas pli grandan parton de la ĉielo ol en la orienta

parto. Vere tiu parto ne aspektas tiel, kiel oni imagas al si Usono kun nubskrapiloj kaj dense lokigitaj domoj, sed oni vidas vastajn kampojn, densajn arbarojn kun grandaj cedro-arboj kaj abioj, riverojn kun rapidaj torentoj, lagojn kaj maron. Multaj nomoj estas indiandevenaj en tiu regiono. Ofte la nomoj estas nomoj de diversaj triboj, kiuj iam loĝis kaj vagadis en tiu naturo. Kelkaj ekz: Yakima, Spokane, Isaquah, Walla-Walla, Waiilatpu.



La nomo de la granda urbo Seattle devenas de la nomo de indian-tribestro. Ni faris tritagan interesan vojaĝon tra la montoĉeno Kaskadoj al la Orienta parto de la ŝtato Washington, kiu aspektas tute alia ol la regiono laŭ la bordo. La ĉeborda regiono estas dense loĝigita, grandaj urboj kaj havenoj. La interna parto konsistas el



malaltaj vastaj montoj sur kiuj oni kultivas grenon, maizon aŭ paŝtigas bovinojn. Lastatempe multaj vitejoj establiĝis sur la deklivoj de la montoj. La terkvalito estas tre taŭga por tia kultivado. Apud ĉiu vitejo oni aranĝis popularajn vingustumejojn.



En unu loko malnova eta lernejo fariĝis luksa vingustumejo. Sur la etikedo de la buteloj estas bildo kaj nomo de la lernejo. Populara vino! Ni tranoktis en la urbeto Walla-Walla, kiu iam estis la regiono de la tribo kun la sama nomo. Nun ĝi havas universitaton kun 10 000 studentoj. Domoj kaj "campus" similas al tiuj de britaj universitatoj.

Laŭ la stratoj de la urbo staras multaj sufiĉe belaj domoj en stilo de Viktoria de la unua duono de la 20-a jarcento kaj kelkaj malpli elegantaj domoj. Tiu sufiĉe agrabla urbeto estas nun populara loĝloko por emerituloj kaj tio signifas ke la prezoj de la domoj kreskas.

En la mezo de la 19-a jarcento komencis blankuloj veni al Okcidento (The West). Kelkaj venis de la sudo, el Kalifornio al Oregon Country. Ili ĉasis, fiŝkaptis kaj vendis peltojn de la bestoj. Fariĝis Oregon-febro. Baldaŭ, jam 1843, oni komencis konstrui lernejojn, preĝejojn kaj krei vilaĝetojn. Kelkloke la blankuloj kaj la indianoj sufiĉe bone kunlaboris. Iu tribo kune kun iuj blankuloj kreis alfabeton kaj lernejojn. Kelkloke ili eĉ kreis teksejojn, segejojn kaj forĝejojn. Ili komercis. En diversaj lokoj tiaj aferoj okazis,

sed iom post iom la indianoj estis forpelitaj de diversaj leĝoj fare de la Kongreso de USA.

Nun la indianoj loĝas en pluraj rezervejoj, en kiuj oni vendas indianajn manlaborojn, aranĝas hotelojn, restoraciojn, muzeojn, sed ankaŭ kazinojn kaj grandegajn butikojn kun malmultekostaj varoj por vendi al turistoj.

En urbeto Topinish ni vizitis interesan indianmuzeon, kiu rakontis pri la vivo kaj kulturo de la tieaj triboj. Ili ofte konstruis domojn al kiuj oni revenis dumvintre, nur uzis la tendojn somertempe. Ili kunvivis kun la naturo, rigardis la teron kiel Patrino Tero. Ili uzis diversajn plantojn, ekz "sage-bush", plantoj kiujn oni ofte vidas tute sekaj ĉirkaŭpuŝitaj de la vento. Ili abunde kreskas sur la deklivoj. Ĉiuj partoj de tiuj plantoj estis uzitaj en la ĉiutaga vivo de la indianoj. Ili preĝas al la bestoj, kiujn ili devas ĉasi kaj mortigi kaj pardonpetas al ili.

En la muzeo estis montritaj belegaj manlaboroj, diversaj vestoj eĉ gantoj. Estis multege por lerni en tiu muzeo, sed oni bezonas multe pli da tempo por profunde vidi ĉion.

En Walla Walla ni vizitis alian muzeon pri Marcus Whitman. La indianoj de tiu regiono iel alvokis Whitman veni al ili por instrui al ili "civilizacion". Whitman venis kun sia edzino, kiu naskis kvar filinojn en Walla-Walla. Whitman kun familio bone kunlaboris kun la indianoj, kreis lernejon, malsanulejon., komencis krei alfabeton. Ili helpis unu al la aliaj.

Sed malbonŝance okazis epidemio de morbilo. Indianoj kaj blankuloj malsaniĝis. Ĉiuj ricevis la saman medikamenton, sed bedaŭrinde ĝi ne helpis al la indianoj, kiuj grandskale mortis. La indianoj kredis ke la blankuloj mortigis ilin kaj aranĝis grandan masakron 1897, dum kiu preskaŭ ĉiuj blankuloj estis mortigitaj. Unu el la filinoj

postvivis. Mi vidis foton pri ŝi en iu libro pri historio de "The West".

En la jaro 1843 okazis La Granda Migrado tra la kontinento. La vojo, kiun ili vojaĝis per vagonoj aŭ per ĉevaloj estas nomita Oregon Trail. Ankaŭ ni per aŭto parte sekvis ĝin. Plurloke ni trovis signojn kaj informojn pri ĝi. La konata Marcus Whitman sekvis ĝin.

En 1844 sep orfaj infanoj troviĝis sur tiu "vojo", alvenis al la vilaĝeto de Whitman, kiu alprenis ilin en sian familion. Inter la jaroj 1804–06 volis du anglaj aventuristoj serĉi vojon tra la kontinento por trovi Columbia River kaj la vojon al La Pacifiko. Ili bone dokumentis sian "vojaĝon". Ankaŭ laŭ la vojo oni vidis ŝildojn rememore pri ili.

Rakonto el 1860: En tiu jaro Cynthia Ann Parker kiel naŭjarulino estis forrabita de Comanche-indianoj kaj ŝi vivis en tiu tribo, edziniĝis kun viro el la tribo. Ili havis tri infanojn. Kelkajn jarojn pli poste, post interbatalo inter la tribo kaj blankuloj ŝi estis rekonita de sia onklo kaj estis reprenita por vivi en la socio de la blankuloj. Ŝia familio estis malagrabra al ŝi kaj ŝia filino, nomis ilin barbaroj kaj entute traktis ilin malŝate. La patrino volis reveni al la prerio, sed ne estis permesata tion fari. Ŝia filino malsaniĝis en pneŭmonito en la jaro 1883. Ŝi mem mortis kelkajn jarojn pli poste. Unu el ŝiaj filoj vivis sur la prerio, fariĝis rezistanto kontraŭ la blankuloj. Li hazarde trovis la tombon de sia patrino kaj kunportis kun si ŝiajn korpajn

restaĵojn kaj entombigis ŝin sur ŝian karan prerion. Kelkajn monatojn pli poste li mem mortis kaj estis entombigita apud ŝi.

Mi ja partoprenis la grandan feston Thanksgiving. Ĝi memorigas pri unuaj komunaj dankofestenoj inter indianoj kaj blankuloj por la jara rikolto. Tio okazis jam en la 17-a jarcento kiam la Pilgrimoj alvenis per la ŝipo Mayflower. Kelka tempo post la komuna danko-festeno laŭdire la blankuloj masakris grandajn grupojn de indianoj. Laŭ mi iom stranga ideo, ke la novaj loĝantoj en Usono dum jarcentoj memor-festas tiun unuan Thanksgiving post tia okazintaĵo.

Nuntempe la indianoj ĉiun jaron celebras feston al la Suno padelantaj laŭ la marbordo pasante la insulon Camino (proksime al la kanada limo). Antaŭe fiŝkaptistoj de Seattle paŭzis sur tiu insulo survoje al Alaska por fiŝkapti salmojn kaj aliajn fiŝojn.

Nun Ingegärd kun familio havas dometon tie kaj ni promenadis laŭlonge de La Pacifiko, vidante ardeojn, maraglon. Tiun lastan oni povas vidi de la fenestro de la dometo. Mark Twain skribis: La teritorio estas mirakle riĉa je oro, arĝento, plumbo, karbo, fero, hidrargo ... ŝtelistoj, murdistoj, banditoj, sinjorinoj, infanoj, advokatoj, kristanoj, indianoj, ĉinoj, hispanoj, spekulistoj, ruzistoj, sovaĝaj hundoj, poetoj, predikantoj, kunikloj ... Jen kelkaj el miaj rememoroj de mia vizito en The West!
/Kerstin

Ralf Jalming pri sia unua vizito en Moskvo

Mia unua vizito en Moskvo

Estis fine de februaro 1979. Post longa preparado mi flugis al Moskvo por renkonti miajn du korespondantojn Svetlana Dzjuba kaj Viktor Kudrjavcev. Mi estis freŝa esperantisto ekde 1975 kaj baldaŭ mi ekhavis kelkajn leteramikojn. Vojaĝo al Soveta Unio

kaj tie iun renkonti bezonis longan kaj detalan preparadon. Komunikado dum tiu tempo ne estis tute facila. Telefoni estis malfacile kaj preskaŭ ne funkciis.

Restis nur leterskribado kaj tio bezonis longan tempon. Ĉirkaŭ unu semajnon letero estis survoje por atingi sian celon en Soveta

Unio. Mi ofte registris la leterojn en la poŝtejo por esti iom pli certa pri ĝusta alveno.

Fakte ne estis mia unua vojaĝo al Soveta Unio. Kelkajn jarojn pli frue mi partoprenis en krozado per la ŝipo Mihail Kalinin al Leningrado. Tiu vizito daŭris nur du tagojn. Sed en Moskvo mi ne estis pli frue. Mi iris kun sveda grupo. Tio estis la plej facila maniero tien iri.

Individuaj vojaĝoj estis tiutempe malfacilaj kaj komplikaj.

Post la alveno al la flughaveno Sheremetjevo ni eksciis ke ni loĝos en la konata, fama hotelo Metropole ĝuste en la centro, proksime al la Ruĝa placo.

La tagon poste mi kun streĉa sento iris al la loko interkonsentita kun Viktor sur la Ruĝa placo. Estis apud statuo kiu montras du personojn el la rusa historio. "Unu staras kaj la alia sidas" kiel li skribis.

Mi estis duonhoron tie antaŭ la tempo por ne maltrafi ion. Viktor loĝis en okcidenta Siberio. Liflugis al Moskvo kaj tie loĝis ĉe amikoj.

Svetlana origine estis el Ukrainio sed nun ŝi loĝis kaj studis en la moskva universitato.

Post iom da atendo Viktor venis en ĝusta tempo. Juna, afabla kun lipharoj. Li portis la tipan rusan peltĉapon kiel preskaŭ ĉiuj rusaj viroj vintre.

Dum tiu tago ni vizitis la Kremlon kaj la historian muzeon, kiuj situas proksime al la Ruĝa placo.

Pli malfrue la saman tagon mi renkontis Svetlana apud la Bolŝoj-teatro. Ŝi estis malalta, vigla, parolema. Ŝi povis lerte kaj detale rakonti multe, speciale pri arto, kiam



Sur la Ruĝa placo staras Viktor, Ralf kaj Svetlana.

ni vizitis diversajn lokojn kiel la Tretjakovskaja galerio. Ĝi estas fama muzeo pri rusa arto.

Dum la ĉirkaŭ kvin tagoj en Moskvo ni vizitis multajn vidindaĵojn duope aŭ triope.

La unuan de marto estis mia naskiĝtago. Mi invitis Viktor kaj Svetlana al mia ĉambro en la hotelo. Tio estis iom kuraĝa afero ĉar dum tiu tempo ne estis tute akceptebla por sovetanoj renkonti eksterlandanojn kaj oni ne sciis kio povus okazi.

Sed nenio malbona okazis. Ni havis agrablan vesperon, parolis kaj trinkis vinon. Svetlana kantis rusajn popolajn kantojn per bela voĉo.

La tagoj en Moskvo pasis rapide. Mi poste vizitis Sovetunion kaj poste Rusion plurfoje sed tiu unua vizito en Moskvo havas specialan lokon en mia memoro. Ĝi ŝajnas al mi nun preskaŭ kiel fabelo.

Viktor kaj Svetlana vizitis min en Svedujo dum la 90-aj jaroj, kiam estis pli facile por ili vojaĝi eksterlanden. Sed tio estas ja alia historio!

/ Ralf

Strangaj kreskaĵoj

de <https://www.listor.se/djur-natur/15-haftiga-vaxter/>



Welwitschia

La *welwitschia*-planto, kiu kreskas en la dezertaj areoj en Namibio kaj suda Angolo, estas ekstreme hardita kaj povas atingi la aĝon de 2000 jaroj.

Lithops julii – "Ŝtonfolio" (stenblad)

Ĝi kreskas en suda Afriko kaj oni facile intermiksas ĝin kun ŝtono. La vorto "lithops" devenas de greka vorto, kiu signifas "ŝtonsimila". Genie! Ĝi eble ne estos formangita.



Actaea pachypoda – "Trollduva" – Ogra kolombo

Actaea pachypoda estas kreskaĵo kiu devenas de Nord-Ameriko. Tie ĝi nomiĝas "doll's eyes", la okuloj de pupo. Ĝi estas tre venena.

Dracula sergio

La orkideo *Dracula sergio* ricevis la nomon ĉar la floroj ja similas al etaj vampiroj. Ĝi kreskas en altaĵoj en Kolombio kaj sekrecias fortan fungodoron por logi muŝojn.

